der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

14. Jahrgang Nr. 90 (4/1978) 30 Pf

Manfred Arnold

Pripensu, sinjor' senatoro!

Vi donis, sinjor' senatoro,
la voĉon favore al bomb',
al nova, al „pura, humana"
kun nesuperebla aplomb'.

Por stopi progresan socion
vi ĝin opinias rimed',
sed paco kaj socialismo
neniam por vi estos pred'!

Ĉu kredas vi, tiu rezulto
de via milita esplor'
redonos al vi la potencon
de iam, sinjor' senator'?

La bombo ne povas returni
la radon de l'mondhistori',
ĉar nuna homar' jam ne kuros
en sian pereon por vi.

Pripensu, sinjor' senatoro,
por kiu ekzistas danĝer',
ĉar nuntempe neatingebla
neniu ja estas sur ter'!

Ne ĝenos la „pura armilo"
ekmarŝon de l'popolamas';
jam estas la brak' tro mallonga,
la brako de ekspluantklas'!

Pripensu, sinjor' senatoro,
meditu ĝisfunde pri l'plan'
kaj pri ĝiaj limoj kaj sekvoj!
Vi sidas sur propra vulkan'!

Rezolucio kontraŭ la neŭtrona bombo

La reprezentantoj de la Esperanto organizaĵoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando kaj Sovetunio kaj de la sekcioj de la Mondpaca Esperanto-Movado el tiuj landoj, kunvenintaj de la 21a ĝis la 27a de marto 1978 en Proprad (ČSSR),

diskutinte la planon de la Usona registaro produkti la neŭtronan bombon kaj lokigi ĝin unue en Eŭropo,

aliĝas al la internacia kampanjo iniciatita de la Monda Packonsilantaro, kontraŭ la nova amasmortigilo,

energie protestas kontraŭ tiu krima plano kaj postulas absolutan malpermeson de la neŭtrona bombo, kiu grave akcelas la vetarmadon,

kaj alvokas en la nomo de la vivo ĉiujn esperantistojn de la mondo levi sian voĉon por senkondiĉa kaj totala malarmado kaj por la detruo de ĉiuj amasmortigiloj.

Forigu la danĝeron de la katastrofa milito!

Proprad, 27. 3. 1978

Protestoj kontraŭ la neŭtrona bomba

La esperantistoj en Kulturligo de GDR daŭre denove esprimas sian decidan proteston kontraŭ la produktado de la neŭtrona bombo kaj ĝia lokigo en Eŭropo fare de la usona registaro. Distriktaj kaj subdistriktaj laborrondoj aliĝas al la internacia protestkampanjo, iniciatita de la Monda Packonsilantaro, inter ili laste la Subdistrikta Laborrondo Leipzig kaj la Distrikta Laborrondo Rostock, kiu subskribis la alvokon kune kun polaj esperantistoj el Szczecin. Jen ilia protesto:

Esperantistoj el Szczecin kaj Rostock diras denove „NE“ al la Neŭtrona bombo!

Okaze de la amikeca renkontiĝo inter polaj kaj germanaj geesperantistoj el nia partnera urbo Szczecin en Rostock, ni komune protestas kontraŭ produktado kaj instalado de la tielnomataj puraj amasmortigiloj la „neŭtrona bombo“ en kapitalismaj landoj. Ni subskribantoj, membroj de la Pola Esperanto-Asocio kaj Esperanto membroj de la Kulturligo de GDR, samtempe adeptoj de la „Mondpaca-Esperanto-Movado“ certigas al vi, ke ni donos niajn fortojn por realigi daŭran pacon, popolkompreniĝon kaj progresan evoluon tutmondan!

En la nomo de:

Pola Esperanto-Asocio
Filio Szczecin
(Sekvas subskriboj)

En la nomo de:

Kulturligo de GDR
Laborrondo E-to Rostock
(Sekvas subskriboj)

Iamaj laboristaj esperantistoj renkontiĝis

Tre instrua pri la aktuala politika profilo de ŝtato sendube estas ĝia rilato al la tradicioj, al sia historio.

Kaj oni devas demandi pri la rilato al *kiuj* tradicioj. Tio ankaŭ plene validas por la Esperanto-movado.

En Germana Demokratia Respubliko la Esperanto-movado sekvas difinitajn tradiciojn, tiujn de la revolucia laborista Esperanto-movado. Materialon pri tio oni ofte trovis sur la paĝoj de „der esperantist" kaj en la GDR-eldonoj de „Paco". Kaj tiel estos ankaŭ estonte. Sed ne nur en Esperanto aperis diversampleksaj studoj. Multiĝas tiaj ankaŭ en la germana lingvo, en neesperantistaj materialoj. Centra Laborrondo prilaboradas sufiĉe grandan objekton: Temas pri ampleksa, riĉe dokumentota kaj ilustrota libro pri la *internacia* laborista Esperanto-movado, kaj speciale pri la *germana*. Ĝi aperos germanlingve dum la 80-aj jaroj. La okupiĝo pri la historio de la laborista Esperanto-movado havas nenion komunan kun iuspeca nostalgio. La tradicioj estas vivaj, nuntemprilataj kaj futurinspiraj. La esperantistoj, organizitaj en Kulturligo de GDR, ne nur kreive aplikadas la instruojn kaj spertojn el la laborista Esperanto-movado (kaj kompreneble ankaŭ la progresemajn humanismajn tradiciojn de la burĝa movado, kiuj sendube ekzistas kaj kiujn ni ne devas ignori!).

La ĉiutaga agado estus neimagebla sen la aktiva partopreno de la veteranoj. Tio tre klare videbliĝis denove dum renkontiĝo de iamaj membroj de la Germana Laborista Esperanto-Asocio, kiu okazis la 15an de junio 1978 en Berlin, kaj kiun partoprenis 40 personoj.

La celo de la renkontiĝo estis pliprofundigi la sciojn pri la historio de la laborista Esperanto-movado kaj tiri el ĝi la necesajn instruojn por la aktuala agado. Krome oni informis pri la stato de la esplorado kaj pri pluaj paŝoj ĉi-direkte.

La partoprenintoj omaĝis la forpasintajn kamaradojn, inter ili la unuan prezidinton de CLE, nian neforgeseblan Rudi Graetz. Sonbendo reportis al ni lian voĉon el kolokvo okazigita 1974 en Gotha. D-ro Detlev Blanke post tio amplekse prelegis pri problemoj de la historio de la laborista Esperanto-movado kaj ties esplorado. Li motivigis detale la gravecon de la tradicioj por la nuntempo, skizis la ĉefajn historiajn liniojn de la komencoj (1900) ĝis la nuntempo kaj prezentis la situacion rilate la esplorojn pri la laborista Esperanto-movado. Interalie la oratoro akcentis, ke estas necesaj pli detalaj esploroj pri i. a. jenaj temoj:

— *rilatoj inter GLEA kaj KPG, GLEA kaj IfA (Interessengemeinschaft für Arbeiterkultur, Interesosocieto por Laborista Kulturo),*

— *rilatoj inter komunistaj, socialdemokratiaj kaj alitendencaj laboristaj esperantistoj,*

— *rilatoj inter t. n. neŭtralaj kaj klasbatale engaĝitaj laboristaj esperantistoj,*

— *historio de SEA (Socialista Esperanto-Asocio) kaj de anarkistaj grupoj*

— *historio de Nova Germana Esperanto-Movado (faŝismo);*

— *rilatoj de laboristaj esperantistoj al esperantistoj de aliaj landoj (sufiĉe bone konataj estas la rilatoj al Soveta Unio, malplikonataj tiuj al aliaj landoj);*
— *ilegala batalo de laboristaj esperantistoj post 1933 kontraŭ faŝismo.*

Estas grave, kiel la preleginto akcentis, ke la iamaj membroj de GLEA kaj ankaŭ aliaj laboristaj esperantistoj nepre surpaperigu siajn memorojn. Ili estos grava materialo por CLE. Plue necesas nepre certigi, ke neniu valora materialo perdiĝu (revuoj, fotoj, korespondaĵoj, libroj, dokumentoj k. s.). CLE volonte akceptos ĉiuspecan materialon, retenos ĝin aŭ post fotokopiado redonos ĝin al la posedantoj.

Cetere, CLE pretas surbendigi memorojn, se iu veterano ne tro volonte skribas.

La diskuto alportis interesajn vidpunktojn kaj pliprofundigis diversajn aspektojn.

Sonbendintervjuoj, faritaj de d-ro Blanke, kun iamaj aktivuloj de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (N. Aleksiev, Ch. Gorov, A. Grigorev) kaj kun la soveta partia kaj esperantista veterano Isaak Krolik, estis interesa interludo. Materialriĉa ekspozicio de dokumentoj, parte mem alportitaj de la partoprenintoj de la konferenco, donis superrigardon pri unika materialo.

La veteranoj disiris post kelkaj horoj, sed certe rekunvenos 1979, kaj tiam nepre estos pli da tempo.

Diru al mi pri viaj tradicioj kaj mi diros al vi, kiu vi estas . . . Ni flegas la ĝustajn tradiciojn! —*e*

Komuniko pri la XI-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de Eŭropaj socialismaj landoj

En la tempo de la 21a ĝis la 27a de marto 1978 en Proprad okazis la XI-a Konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj, kiun partoprenis la reprezentantoj el Bulgario, Ĉeĥa Socialisma Respubliko, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando, Slovaka Socialisma Respubliko kaj Sovetunio. La partoprenintoj pridiskutis la demandojn de la pliprofundigo de kunlaboro de iliaj organizaĵoj kaj speciale akcentis la rolon de esperantistoj en la batalo por la paco, malstreĉiĝo kaj malarmado.

Dum tiu Konsultiĝo kunvenis ankaŭ reprezentantoj de landaj junularaj sekcioj. La kunvenintaj junularaj gvidantoj sin informis reciproke pri la stato de junulara Esperanto-movado en siaj landoj kaj pritraktis la plifortigon de estonta kunlaboro. Speciale traktitaj estis la edukado de kadruloj kaj la kunagado kun TEJO.

La konsultiĝo akceptis rezolucion kontraŭ la neŭtrona bombo. La partoprenintoj esprimis dankon pro la bonegaj laborkondiĉoj al la gastiganta Esperanto-Asocio de Slovaka Socialisma Respubliko.

Proprad, la 27an de marto 1978

Amasa organizaĵo

En la Bazaj Taskoj de Kulturligo oni karakterizas la organizaĵon kiel *amasa.* Tiu konstato havas kvalitan kaj kvantan aspektojn. La amasa organizaĵo kun 200 000 membroj estas multe malpli granda ol ekzemple la Libera Germana Junularo, milionmembra. Sed „amasa" rilatas ankaŭ al la socia influo. Multaj unuopaj kulturagantoj el la plej diversaj fakoj de KL, ankaŭ la esperantistoj, per siaj prelegoj, ekspozicioj, publicaĵoj kaj aliaj aktivecoj havas amasan influon, atingas amasojn. Tio estas la kvalita aspekto.

Kaj krome, kompreneble, la influo de organizaĵoj ankaŭ estas influata de la membro-nombro. Ju pli da membroj, des pli da ebloj de agado. Tio estas kvanta aspekto.

Ŝajne, ke en la esperantistaj rondoj en KL tiu lasta aspekto ne ĉiam estas sufiĉe atentata. Ĉar vere oni nepre kaj konscie devas ĉiam *varbi* novajn membrojn por KL. Tiuj membroj en siaj membrokartoj estas identigitaj kiel *esperantistoj.* Ili do ne nur kreskigas la membraron de KL sed ankaŭ la membraron de ĝia relative memstara ero, la esperantistaro.

Al tiu problemo havas senperan rilaton ankaŭ jeno: Laŭ la novaj Bazaj Taskoj KL volas „ĉiam pli da laboruloj instigi por aktiva partopreno en la spirita vivo kaj kultura kreado". Kaj krome oni legas, ke KL sin direktas „al ĉiuj civitanoj de nia respubliko, al laboristoj, al kamparanoj kaj speciale al la kulturaj kaj spiritaj kreantoj . . ."

Ni sepeciale rigardu la laboristojn. De la tuta membraro en KL ĝis nun estas 18 % laboristoj.

Certe la kvoto por la esperantistoj estas eĉ pli malgranda, se ni ne rigardas pensiulojn sed la aktivajn laboristojn. Sendube estas serioza problemo, kielmaniere atingi pli da laboristoj ol ĝis nun. Prave kaj rajte ni ĉiam denove substrekas la gravecon de la revoluciaj tradicioj de la laborista Esperanto-movado.

Sed ja temis pri *laborista* movado, KL ne havas grupojn en fabrikoj. Sed nenio malhelpas al ni esperantistoj konsideri jenajn paŝojn:

- pli forte informi pri Esperanto kaj ĝia utilo en laboristaj medioj (per fabrikgazetoj, prelegoj antaŭ socialismaj brigadoj, ekspozicioj),
- nepre serĉi la kunlaboron kun la sindikataj organizaĵoj kaj ties kulturaj fakoj, tiel, ke oni enigu Esperanton en la ĝeneralan kulturagadon de difinitaj fabrikoj kaj entreprenoj,
- utiligi Esperanton kiel kontaktilon al sindikataj grupoj aŭ laboristaj brigadoj el aliaj landoj (i. a. la hungaraj amikoj ĉi-rilate havas jam spertojn).

Grava tereno ankaŭ estas la faklernejoj kaj loĝdomoj (internulejoj) de profesio-lernantoj. Oni ne nepre havu la iluzion ĉiam sukcesi en la organizo de kursoj. Kelkfoje oni sukcesos, kaj kelkfoje ne. Gravas antaŭ ĉio la informado kiu iam portos fruktojn.

Skribu viajn opiniojn kaj spertojn!

D. Blanke
(daŭrigota)

Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Leo Tolstoi

Ĉi-sube ni ne prezentas omaĝon al la granda ruso, kvankam tio estus valora kaj grava, i. a. ankaŭ pro lia pozitiva rilato al la internacia lingvo.

Ni havas iom neordinaran eblecon rememorigi pri Tolstoi. Sed legu mem parton el letero de Robert Stoffers el Cassis, Francio, Ĉi-foje germane pro la originalo de la letero:

. . . Hin und wieder erhalten wir auch Besuch von dem ehemaligen Sekretär des berühmten Poeten Leo Tolstoi. Nun werden Sie denken: Der entsprungene Nordseebewohner wickelt jetzt Schiffergarn ab. Trotzdem Leo Tolstoi schon 1910 starb, ist es kein Schiffergarn, sondern Gegenwart. Der ehemalige Sekretär feierte gerade jetzt im Februar seinen 97. Geburtstag. Geboren wurde der Esperantist Victor Lebrun in Wladiwostok. Der Vater war ein französischer Eisenbahningenieur und baute zu der Zeit an der Sibirischen Eisenbahn. Victor Lebrun war ein Verehrer von Leo Tolstoj, zog schon als Student ganz in dessen Haus, wurde sein Sekretär und blieb es zehn Jahre bis zum Ableben des großen Russen. Durch Tolstoj kam V. Lebrun mit Esperanto in Berührung und blieb bis heute dem Esperanto treu.

Victor Lebrun zog 1910 in das ferne Kasachstan und lebte dort als Bauer. Der Bürgerkrieg raste über seinen Hof. Am Tage waren die Weißen, in der Nacht die Roten Besetzer des Kulakenhofes. Natürlich glaubten die Weißen in dem Kulacken Lebrun einen der ihren zu sehen. Er aber hatte auf die Roten gesetzt und wurde deren Kundschafter. Er setzte auf das richtige Pferd. 1925 wollte er heim in das Land seiner Väter. Er durfte sein unbewegliches Eigentum verkaufen und durfte mit Sack und Pack, mit russischer Ehefrau und Kindern nach Frankreich ausreisen.

In der Provence lebte er wieder als Bauer, aber hauptsächlich als Bienenzüchter. Als Tolstojaner lebte er immer sehr einfach. In der langen Zeit starb seine Frau, und dann lebte er in großer Einsamkeit. Vor vielen Jahrzehnten brannte das Dorf ab, es blieben nur Ruinen. Vielleicht hatte Victor gute Verbindung zum Himmel, dem Feuerteufel wurde Halt geboten, und so blieb ein kleines Häuschen zwischen den Ruinen vom Feuer verschont. Die Dörfler liefen davon und bauten ihr Dorf in einer Entfernung von drei km wieder auf. V. Lebrun blieb zurück in der Hütte. Das bedeutete tägliches Training. Er hat gutes Trinkwasser, muß es aber selber aus einem tiefen Brunnen ziehen. Jeden Tag marschiert er die drei km zum Dorf und zurück. Man kennt ihn nur mit einem Rucksack, so besucht er Aix-en-Provence und gelegentlich Marseille und Cassis. Im Moment ist er sehr ungeduldig, voller Spannung und nervös; er wartet auf die Einladung durch die Sowjetunion. In diesem Jahr (9. 9. 78) feiert die Sowjetunion den 150. Geburtstag ihres großen Poeten Tolstoi. Victor Lebrun meint: „Ich muß als der ehemalige Sekretär unbedingt dabei sein".

Bertolt Brecht en „der esperantist“

13, 11 Demandoj de leganta laboristo, tr. A. Fernandez
18/19, 30 La tapiŝteksistoj el Kujan-Bulak honoras Leninon, tr. A. Fernandez
22/23, 24 La moritato de Macky Messer, tr. PAVO
26/27, 21 Se la ŝarkoj estus homoj, tr. H. Schmidt
34/35, 11 La soldato de la Ciotat, tr. Karl Schulze
54, 21 La moritato pri Macki Messer, tr. K. Schulze
57/58, 18 Legendo pri la estiĝo de la libro Taoteking sur la vojo de la emigranta Laotse, tr. K. Schulze
65/66, 42 Letero de Bertolt Brecht al Ludwig Schödl
84, 8 La granda oktobro, tr. W. Pohnert
88, 14 Solidarkanto, tr. H. Rothe

Bertolt Brecht en la GDR-eldonoj de „Paco“

1969 (junio/julio), p. 5—6: Se la ŝarkoj estus homoj, tr. H. Schmidt
1970 (n-ro 7—8), p. 15: La soldato de la Ciotat, tr. K. Schulze
p. 25: La du filoj, tr. K. Schulze
1973 (n-ro 4), p. 32: Per kio vivas hom'?, tr. K. Schulze
p. 32: La kanto pri la nesufiĉo de la homa strebado, tr. K. Schulze
1974, p. 22: Parabolo de l'Budao pri la brulanta domo, tr. K. Schulze
1975, p. 5: „Pacon sur tiu-ĉi tero!“, tr. E. Wichert
p. 6: Anakronisma procesio aŭ libero kaj demokracy
p. 34: Kanto, per kiu Polly aludas al siaj gepatroj sian edziniĝon al la rabisto Macheath, tr. K. Schulze
p. 34: La balado pri la agrabla vivo, tr. K. Schulze
1976, p. 22/23: Fragmento el la Trigroŝa Romano (Persikfloro), tr. K. Schulze
1977, p. 12/13: Infana Kruciro 1939, tr. K. Schulze
p. 20/21: Fragmento el Trigroŝa Romano (Pri la pliboniga efiko de artaĵo), tr. K. Schulze
1978, p. 22: Kantato pri la necerteco de la homaj cirkonstancoj, tr. K. Schulze (Kunmetis L. Knöschke)

Bestellung des „Trigroŝa Romano“

Auf Grund der Tatsache, daß einige Buchhandlungen nur zögernd Bestellungen für den „Trigroŝa Romano“ aufnehmen, empfehlen wir, die Bestellungen direkt an den Verlag Edition Leipzig, 701 Leipzig, Versandabteilung, Postfach 340, zu richten!

Der Verlag gibt die Bestellung an die zuständige Buchhandlung im Bezirk weiter. Dann wird die Bestellung im allgemeinen bearbeitet.

Multmerita tradukisto — nova membro de CLE

D-ro Karl Schulze el Berlin (GDR), konata kiel tradukinto de la romanoj „Nuda inter lupoj“ de B. Apitz kaj „Trigroŝa Romano“ de B. Brecht, elektiĝis pro siaj grandaj meritoj dum la 5-a plenkunsido de CLE la 2-an de junio 1978 en Cottbus, membro de la plej alta esperantista gvidorgano en GDR.

Reflektiĝo de unuopaj kulturoj en esperantlingvaj publikaĵoj

Pri prelego de prof. d-ro I. F. Bociort en Ahrenshoop

Kadre de la internacia scienca seminario, okazinta de 17. – 23. aprilo 1978 en Ahrenshoop (GDR) pri la temo „Sciencaj aspektoj de Esperanto", univ. prof. d-ro Ignat Florian Bociort, delegito de la Rumana Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj prelegis pri la supre menciita temo. Li emfazis certajn meritojn de Esperanto en la reciproka interŝanĝo de kulturaj valoroj inter la popoloj. Jam antaŭ la unua mondmilito Esperanto estis efika instrumento por konigi eksterlanden kelkajn el inter la literaturaj verkoj de la rumana popolo. Nuntempe ĉirkaŭ 80 specifaj kreaĵoj – komencate de la malnovaj popolaj poezioj ĝis la verkintoj de nia epoko (Sadoveanu, Goga, Isac, Blaga, Besciuc k. t. p.) – esperantlingve alportas al la legantoj de pli ol 100 landoj varman humanisman mesaĝon de la rumana popolo. Kaj, reciproke, multe da verkoj alportas al la rumanaj legantoj tiom da bone pensitaj kaj belege esprimitaj sentoj kaj ideoj de alinaciaj kreintoj.

Flanke de tiaj certaj meritoj, oni povas tamen rimarki en pluraj periodaĵoj, libroj k. t. p. kelkajn nedezireblajn erarigajn fenestretojn, kiuj estas nepre evitendaj flanke de la redaktistoj. Ekzemple oni asertas en prestiĝaj eldonaĵoj kiel Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, ke la dakoj (ne dacoj!), unuj el la prauloj de la rumanoj, havis slavan originon, kaj ke ili estis slavdevenaj. Tio estas tute erara, ĉar la slavoj ja alpaŝis la regionon de la nuna Rumanio kelkcent jarojn post la intermiksiĝo de la drakoj kun la romiaj konkerantoj kaj koloniistoj. Oni asertas same, ke la nacia rumana ŝtato naskiĝis en la jaro 1918. Sed ĝi naskiĝis en 1859 per la unuiĝo de du rumanaj provincoj Moldavio kaj Valakio. Profesoro Bociort avertis pri la risko dissendi kaj cirkuligi en Esperanto falsajn, kripligitajn bildojn pri tiu aŭ alia popolo. Unu kialo de tiu stato estas, ke ne ĉiam la aŭtoroj traktantaj pri tiu aŭ alia kutimo estas personoj sufiĉe reprezentaj por la koncernaj brancoj, ne ĉiam apartenas al la koncerna kulturo kaj kelkfoje eĉ ne konas la lingvon de la popolo pri kies valoroj ili skribas. La spegulIĝo de ĉiuj realaĵoj de unuopaj kulturoj estas por ni esperantlingvaj sciencistoj – tiel substrekis profesoro Bociort – afero implikanta altan respondecon. Estas necese respekti ankaŭ en Esperantujo la jam establitajn principojn en pacamaj rilatoj internaciaj, principojn forigantajn la arbitrecon, la fuŝadon, la hazardon en la selektado de verkoj tradukotaj en la ekzakteco de informoj k. t. p. La plej taŭgaj reprezentantoj de naciaj kulturoj estas la sciencistoj, la verkistoj, la kulturkreantoj de ĉiu koncerna lando. Necesas, ke la redakcioj sendu, cele de konsultado, la publikigotajn artikolojn al la estraro de la Esperanto-movado en la koncerna lando, en la intereso de la vero, de la naciaj kulturoj, de la prestiĝo de la Esperanto-movado. Rilate la interlingvistikajn esplorojn en Rumanio prof. Bociort citis amplekse kaj konkrete la plej gravajn studojn kaj artikolojn, novajn kaj malnovajn, pritraktantajn la problemon de internacia lingvo. Samtempe li informis

pri la atingoj en la klopodoj estigi la necesajn strukturojn por plialtigi la sciencan esperantologian/interlingvistikan agadon en Rumanio. Li donis ampleksan bildon pri la problemaro nuntempe studata kaj en akademiaj rondoj kaj en universitatoj (fare de profesoroj aŭ/kaj de gestudentoj). Kun intereso oni eksciis pri la enkonduko de Esperanto kiel nedeviga studoobjekto en la filologiajn fakultatojn de rumanaj universitatoj ekde septembro 1978.

Novaĵoj el Rumanio

Kiel informis nin prof. d-ro I. F. Bociort, elstara rumana sciencisto de la universitato en Timişoara, fondiĝis dum majo en Rumanio scienca esperantologia/interlingvistika kolektivo ĉe la Akademio de Politikaj Sciencoj de Rumanio. Prezidanto de tiu-ĉi kolektivo estas prof. Bociort. Krome per ministra dekreto estis kreita la ebleco principa instrui Esperanton en ĉiuj filologiaj fakultatoj de Rumanio. Ni atendas pluajn informojn.

Aldone al la raporto pri Ahrenshoop, „de“ 3/78, p. 9

Estis krome detale informite pri la studo de la rumana lingvisto, universitata asistanto el Bukaresto, Constantin Dominte „Fonostatistikaj rimarkoj pri Esperanto“.

Moscow News kun Esperanto

Lastatempe la sovetuniaj esperantistoj zorgis por kelkaj surprizoj. Pri la esperantlingva disaŭdigo de Radio Moskvo februare ĉijare ni jam raportis.

By air—from Moscow

MOSCOW NEWS

ĈI-numere—speciala aldono en ESPERANTO:

L. I. BREJNEV

pri la tutpopola pridiskuto de Konstitucio de USSR

No. 10 (2790), Saturday, March 11, 1978 ★ WEEKLY First published October 5, 1930

Alia surprizo estis la n-ro 10 (2790), March 11, 1978 de „Moscow News“, revuo pri USSR por la eksterlando, kiu aperas en la angla, hispana, franca kaj araba lingvoj. La angla eldono supre menciita enhavis ampleksan 14-paĝan aldonaĵon en Esperanto, la raporton de L. I. Brejnew en la sesio de la Supera Soveto de USSR la 4-an de oktobro 1977 „Pri la projekto de Konstitucio de Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj kaj pri la rezultoj de ties tutpopola pridiskuto“.

Sur la insulo de la libereco

El letero de nia pacamiko Rene Valdes Lopez el Habano oni ekscias interesajn novaĵojn el la vivo de kubaj esperantistoj.

En la sidejo de la Kuba movado por paco kaj suvereneco de la popoloj, apartenanta al la monda packonsilio, en pasinta oktobro okazis renkontiĝo de la prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio Nguyen van Kinh kun grupo da habanaj esperantistoj (Andres Rodriguez, Rufino Lopez, Fernando Paredes kaj Rene Valdes). Oni interŝanĝis ideojn kaj spertojn pri la evoluo de la esperanta movado en ambaŭ landoj kaj antaŭ ĉio pri la eblecoj uzi Esperanton serve al la mondpaco. Gvidantoj de la Kuba porpaca movado povis konstati la utilon de Esperanto kaj eĉ promesis studi la eblecojn de kunlaborado kun la esperantistaro en proksima estonto. Estis proponite formi MEM-sekcion kiel helporganon al la Kuba porpaca movado. Oni studos tiun proponon. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ membro de la Centra Komitato de Kuba komunista partio kaj altranguloj de la registaro. Ili esprimis pozitivan rilaton al la esperantista porpaca movado.

Oni surbendigis mallongan salutparoladon de pacamiko Kinh al la kubaj geesperantistoj kaj al tuta kuba popolo. Oni sendis tiun mesaĝon por la landa radio en la kadro de unuhora programo dediĉita al Esperanto okaze de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof. En la programo oni inkluzivis kantojn en Esperanto, interalie ankaŭ de Miŝo Zdravev.

Kvar kubaj esperantistoj faris prelegojn en la publika biblioteko „Maksimo Gomez“ pri Esperanto kaj pli speciale pri Mondpaca Esperantista Movado.

Lige kun la antaŭstaranta en Kubo XIa Monda festivalo de la junularo kaj la studentoj la kubaj amikoj petas la junajn esperantistojn, partopreni la festivalon kaj popularigi la internacian lingvon inter la junularo kaj la studentoj. La Kuba preparkomitato promesis studi la eblecon por organizado de Esperanto-evento dum la festivaltagoj. En la konata plej grava mezlernejo en Havano „V. I. Lenin“ grupo da junuloj lernas Esperanton por povi partopreni la festivalon kaj kontaktiĝi kun esperantistoj el aliaj landoj

Oni petas la esperantistojn de ĉiu lando kontakti la junularajn organizaĵojn kaj la festivalajn preparkomitatojn kaj proponi al ili partoprenon de esperantistoj en la festivalo en Kubo. Estas konvene, ke kiel eble plej multaj junaj esperantistoj, sed antaŭ ĉio organizaĵoj skribu rekte al Kubo al la adresoj de la landa kaj de la internacia preparkomitatoj. Jen iliaj adresoj: Comite Nacional Preparatorio del XI Festival Mundial de la Juventud, Ave. 3 ra. no. 1805 entre 18 y 20, Miramar, La Habana, Cuba/ Kubo; Comite Internacional Preparatorio del XI Festival Mundial de la

Juventud y los Estudiantes, Calle 7 ma entre A y B, Reparto Altahabana, La Habana, Cuba/Kubo.

Korespondu kun Kubaj lernantoj.

Junuloj inter 12 kaj 19 jaraĝaj el la mezlernejo „V. I. Lenin“ en Havano lernas Esperanton por partopreni la XI festivalon de la junularo kaj la studentoj en fino de julio kaj la unua dekado de aŭgusto j. k.

Ili deziras korespondi en Esperanto. Se oni multnombre skribos al ili, tio kontribuos al la studado. Kompreneble, havu antaŭvide ke temas pri komencantoj! Jen la adreso: Esperanto-rondo de mezlernejo „V. I. Lenin“, Carretera a Las Guasimas, kni 3 1/2, La Habana, Cuba/Kubo.

(Pacaktivulo 112/1978)

Pri la instruado de Esperanto

D-ro Vilho Setälä artikolis en „der esperantist“ n-ro 83 sub la rubriko „Pri la metodiko de la instruado de Esperanto“ kiel oponanto al la principoj prezentitaj de Violon Oljanov.

Kiel instruanto de Esperanto en diversaj libervolaj kursoj mi tamen dirus iom diverĝan opinion pri la vidpunktoj de d-ro Setälä en la lumo de la nuntempa fremdlingva instruado en la deviga lernejo de nia lando. Preskaŭ duono el la nunaj aĝoklasoj abiturientiĝas, kaj tio signifas ke ili devis lerni minimume tri fremdajn lingvojn; la ĵus enkondukita bazlerneja sistemo devigas preskaŭ ĉiun lerni la elementojn de la angla, do:

1) la instruisto devas utiligi tiun gramatikan kaj vorttrezoran scion, kiun la lernanto havas. Helpe al la lernantoj mi kolektis ĉ. 600 Esperanto-vortojn, kiuj havas rekoneblan ekvivalenton en la ordinara lingvuzo de la finna lingvo. Tiuj vortoj havas tute samajn aŭ partajn formon kaj signifon en ambaŭ lingvoj, kaj estas uzataj en la norma aŭ neformala lingvuzo paralele, aŭ ili estas arkaismoj, sed ĉiuj povas havi memorhelpon el ili.

2) plej gravas reteni la lernanton ĉe la kurso, ĝis li/ŝi ekkonos la esencan facilecon de Esperanto. Tial estas tre danĝere „mueladi“ malfacilajn punktojn, ĉar tio elpelas la lernanton. Plejparte la finnoj forlasas la kurson tuj ĉe komenco, se la instruisto tro detale volas tuj enkapigi la prononcon de malfacilaj ĵ kaj ĝ.

3) la instruisto devas kreskigi le entuziasmon prezentante la idealan flankon de la lingvo, librojn kaj gazetojn. Malofte ĉe la kurso la lernanto ricevas perfektan kaj kompletan lingvoscion, la perfektiĝado estas longa penetrado en la tradicion kaj literaturon de Esperanto per legado kaj partoprenado.

4) la instruisto povas prezenti similaĵojn inter la gepatra lingvo kaj Esperanto: ekz. rilate la finnan la instruisto povas mencii, ke la plurala finaĵo escepte la nominativon estas la sama (i, j), la preterita finaĵo koincidas kun la finna imperfekto, la atributo kaj predikativo same kongruas en ambaŭ lingvoj, la vortordo estas same senbara.

J. Jäntti

Spielend lernen

Seit September 1976 besteht an der Ingenieurschule für Glastechnik, Weißwasser, im Rahmen der Fachschulgruppe des Kulturbundes eine Arbeitsgemeinschaft Esperanto.

Als fachlicher Leiter fungiert der Vorsitzende der Fachschulgruppe, ein Fachschullehrer.

Die jetzige Anfängergruppe empfindet die großen Vorteile des Esperanto. Zugleich ergibt sich ein „Nachteil", den auch andere Sprachen aufweisen: Man muß Vokabeln lernen. Am besten prägen sich Vokabeln ein, wenn möglichst viele Sinne beteiligt sind. Meist fehlt aber die Zeit, wenn ein umfangreicher Wortschatz erarbeitet werden soll.

Nun ist die Teilnahme an einer Arbeitsgemeinschaft eine Form der Freizeitbeschäftigung, die natürlich entsprechend Spaß bereiten soll. Aus diesem Grunde haben wir ein Vokabelspiel erdacht und gefertigt, mit dem spielend gelernt wird.

Es werden kleine Kärtchen aus Karton geschnitten, die in ihren Abmessungen Teile des TGL-Formats A 3 sind. Auf die Vorderseite wird ein Esperanto-Stamm geschrieben. Die Rückseite trägt die deutsche Bezeichnung. Als Ergänzung sind Präfixe, Suffixe oder Affixe sowie die Verbindungen möglich. Das Spiel läßt viele Variationen zu.

Variante 1: Alle Kärtchen liegen mit der Esperantoseite oben. Jeder Spielteilnehmer nennt die deutsche Bezeichnung und darf solange Karten entnehmen, bis er sich irrt. Sieger ist der Spieler mit den meisten eigenen Kärtchen.

Variante 2: Die Reihenfolge wird erwürfelt. Sonst wie 1.

Variante 3: Kenntnis-Test Deutsch—Esperanto. Sonst wie 1.

Variante 4: Jeder Spieler darf sich ein Kärtchen nehmen, wenn er die deutsche Bezeichnung weiß. Weiß jemand nichts, so muß er aussetzen und darf inzwischen im Wörterbuch nachschlagen.

Variante 5: Es werden zusammengesetzte Begriffe angesagt. Jeder Spieler, der über ein Wortbestandteil verfügt, darf anlegen. Der Sieger hat die wenigsten eigenen Kärtchen.

Variante 6: Sätze bilden. Hierzu wird ein Thema angegeben.

Im Gegensatz zu bekannten Spielen für andere Sprachen ist das angegebene Spiel variationsreich möglich, weil das Esperanto regelmäßig aufgebaut ist.

D. Liers

★

Nova lernolibro presata

Ni povas kun ĝojo sciigi, ke la nova, tre moderna kaj originale ilustrita lernolibro de Esperanto de d-ro Till Dahlenburg kaj Peter Liebig nun estas presata. La presprovaĵoj jam estas korektitaj komence de julio. Do oni povas dum novembro atendi la aperon de verko, eldonata de la eldonejo Enzyklopädie Leipzig. Tio signifas, ke komencantoj-kursoj povas esti planataj por januaro 1979.

La ekzisto de d-ro Hillerson pruvita

Ĉiam denove iu asertas, ke Lenin sin esprimis por Esperanto aŭ mem estis esperantisto.

Iom pli malnovaj legantoj de „der esperantist" scias, ke tio estas neniel pruvebla kiel abunde eksplikis prof. S. N. Podkaminer en sia studo „Lenin kaj Esperanto" en „der esperantist" n-ro 42 (1970).

S-ro Jarislav Mařik el Praha kaj aliaj ĉeĥaj esperantistoj pluserĉis en direkto indikita de prof. Podkaminer. Jen la rezultoj:

La gazeto „Esperantista", organo de EAĈSR en Praha, enpresis en sia n-ro 9—10, j. 1948, p. 92, mallongan raporton pri intervjuo, kiun prof. Miloš Lukáš en Praha, kune kun la rusa esperantisto Simon Eliovič (naskita en Ĥarkov) ricevis en la j. 1920 de d-ro Hillerson, la tiama estro de la Soveta Misio en Praha, pri la temo „kiel la sovetoj traktas la esperantistan movadon". En la intervjuo, d-ro Hillerson deklaris sin intima amiko de V. I. Lenin kaj klarigis la opinion de la lastnomita pri Esperanto. La informo estis poste represita en aliaj esp. gazetoj. Prof. S. N. Podkaminer (Leningrado) en sia ampleksa traktato „Lenin kaj Esperanto" (gazeto „der esperantist", Berlino, GDR, n-ro 42/1970, p. 2—22) diras sur p. 17, ke „tiu ĉi indiko (de Lukáš) sendube estas tre grava, sed bedaŭrinde, ĝis nun estis neeble trovi iujn postsignojn de tiu Hillerson". Laŭ prof. Podkaminer „aperas grava tasko por la esperantistoj-historiistoj daŭrigi siajn serĉojn . . .".

Min okupis, do, la ideo sekvi la alvokon de prof. Podkaminer kaj provi dokumenti la ekziston de Hillerson (aŭ Gillerson, laŭ la rusa transskribo). Mia klopodo trovis nun plenan sukceson. La Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj — Ĉeĥoslovaka-soveta instituto en Praha informis min letere, en febr. 1976, pere de la sindikata ĵurnalo Práce, ke d-ro Gillerson estis ĉefo de misio de la soveta Ruĝa Kruco, kiu deĵoris en Praha. **Vico da sovetaj materialoj** pruvas, ke **li kunlaboris al V. I. Lenin** en la tempo de la politika elmigranteco. La Instituto aldonas proprainiciate, sen mia demando, ke „ne estas ekskludite, ke en la jaro 1912 li (H.) estis en Krakovo kaj ke li tie interrilatis kun V. I. Lenin". — La Instituto donas la titolojn de du prihistoriaj verkoj, eldonitaj en Praha 1975, en kiuj oni povas trovi respondojn je demandoj pri Hillerson.[1])

En tiuj verkoj Hillerson estas multfoje citata. PhDr. Jaromir Jermář, scienca laboranto de la nomita Akademio (Filozofia instituto) laŭ mia peto pristudis la verkojn kaj trovis: S. I. Gillerson estis en Praha de la 10-a de julio 1920 ĝis somero 1921 kiel ĉefo de la soveta reenpatrujiga misio de la Ruĝa Kruco, peranta interŝanĝon de militkaptitoj (analoga ĉs. misio, gvidita de majoro Skála, deĵoris en Moskvo). La misio, laŭfakte, estis la unua soveta reprezentantaro en ĈSR kun rajtoj de eksterteritorieco kaj esprimo de agnosko „de facto" pri Soveta Ruslando.

El la cititaj materialoj, fidindaj ekster iu ajn dubo, evidentiĝas du, aŭ tri gravaj faktoj, de ni serĉataj: 1) D-ro S. I. Hillerson **efektive vivis,** 2) Okazis **kunlaboro inter d-ro Hillerson** („vico da sovetaj materialoj pruvas . . .") **kaj V. I. Lenin,** eĉ en tia grado, ke 3) D-ro H. reprezentis en Ĉeĥoslovakio en 1920—21 la junan Sovetan Union en sufiĉe grava ŝtata funkcio.

Jen estas unu flanko de la afero; mi dokumentis la ekziston de persono kaj la specon de rilato de tiu persono al Lenin.

La dua flanko de la afero restas malfermita, ne dokumentita. Estas nek en mia intenco, nek en — memkomprene — mia povo pruvi la aŭtentikecon de la supozata opinio de V. I. Lenin, kiun Hillerson, kunlaboranto de Lenin, komunikis al Lukáŝ kaj Eliovič. Krom la skriba atesto de k-do prof. Lukáŝ ekzistas plu neniu alia pruvo pri la laŭdira lenina eldiro. La intertempe mortinta Eliovič ne plu povas konfirmi ĝin. Mi nur povas aldoni, ke se iu mistifikis en tiu ĉi afero, ĉu bonafide pro nepreciza kono aŭ interpreto de la stato, ĉu male, nepre ne estis k-do profesoro Lukáŝ. — Tiu ĉi mia neŝancelebla kredo al Lukáŝ, kompreneble, ne povis esti pruvo pri la vereco de tio, kion Hillerson diris al li . . .

En Praha la 28an de marto 1976

Jaroslav Mařik/Praha
12000 Praha 2, Malá Štěpánská n-ro 9
ČSSR

[1]) a) Dokumentoj kaj materialoj koncerne la historion de la ĉeĥoslovakaj-sovetaj rilatoj en 1917—1922; b) Resuma historio de la ĉs.-sovetaj rilatoj 1917—1939. — Eldonitaj en Praha 1975.

Al Rudi Graetz

Pasis unu jaro de la forpaso de Rudi Graetz.

Ho, kia perdo kaj doloro:
forpasis nia kara Graetz —
la homo kun varmega koro,
la homo plena de homec'.

Ni amis vin, amiko kara,
kun vi ni marŝis sen hezit'
al revo rava tuthomara —
ke regu paco, ne milit'!

Al vi jen nia ĵurpromeso:
batali plu por amikec',
por mondo paca, por progreso . . .
Ni vin memoros, Rudi Graetz.

Asen Grigorov (Sofia)

(El „Paco" 2/78)

IFER '78

Leipzig survoje al internaciiĝo

La konkludon jam komence: IFER '78 bone sukcesis! Kaŭzo do por prepari IFER '79.

La iam famaj renkontiĝoj dum la Leipzig-a printempa foiro jaro post jaro perdis sian kvaliton kaj degeneris al simpla grupkunveno senprograma. Vidante tion, Leipzig-a Laborrondo Esperanto sub sia nova prezidanto, k-do Rolf Beau, kaj Distrikta Laborrondo Esperanto en 1976 serioze analizis la kaŭzojn kaj konceptis tute novan aranĝon, kies ĉefa ideo estis: internacia renkontiĝo kun altnivela(j) kultura(j) aranĝo(j) sub deklarita temo kaj kun ampleksaj servoj por la partoprenantoj. Ĝi ricevis la nomon „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo", mallonge: IFER.

La unua elprovo de la nova koncepto startis dum la printempa foiro en 1978. La renkontiĝo sub la temo „60a datreveno de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio", kiun ankaŭ vizitis la soveta vickonsulo, k-do Ŝepetov, trovis bonan eĥon kaj kuraĝigis la IFER-komitaton plupaŝi la konceptitan vojon.

Dank' al la publicemo de la Esperanta gazetaro (revuo Esperanto, Heroldo de Esperanto, Literatura Foiro) kaj al la helpo de multaj organizaĵoj (CLE Esperanto, Monda Turismo) kaj individuoj (ekz. s-ano Křivanek el ĈSSR) la renkontiĝo fariĝis vere internacia: partoprenis gastoj el Hungario, ĈSSR, Pollando, FRG, Aŭstrio kaj GDR.

La 106 partoprenantojn atendis interesa programo: sabate (11. 3.) posttagmeze peraŭtobusa urborigardado, vespere post bongusta vespermanĝo kaj vino la kultura vespero sub la temo „Pola kulturo — parto de monda kulturo".

La renkontiĝon malfermis nome de la Organiza Komitato k-do Böttcher. Sekvis mallongaj alparoloj de k-do Hamann (por la DLR Esperanto Leipzig) kaj de s-ino Vogel (por la Urba Estraro de Kulturligo). En siaj paroladoj la reprezentantoj de la diversaj nacioj ne nur salutis la renkontiĝon, sed esprimis la deziron, ke la malstreĉiĝo, nepra kondiĉo por la humanisma agado de la esperantistoj, fariĝu ĉiam pli sekura. Ke la renkontiĝo helpis al pli bona ekkono kaj kompreno, montris s-ano Stuppnik (Aŭstrio), kiu emfazis en sia saluto: „Mi estas la unuan fojon en GDR, sed certe ne la lastan fojon. Mi estas vere tre emociita, ke la situacio ĉi tie estas ege bona. La rondveturado hodiaŭ montris al ni, ke vere multo estis farita ĉi tie kaj ke la vivnivelo estas multe pli bona ol oni ie aŭ ie propagandas aŭ povas legi . . ." K-do Schödl, vicprezidanto de CLE Esperanto, fermis la inaŭguron parton.

Sinjorino Teresa Nemere, scienca kunlaborantino de la Etnografia Muzeo en Toruń, rivelis en sia prelego „Pola kulturo — parto de monda kulturo“ larĝan spektron de la pola kulturevoluo. Specialan atenton ŝi dediĉis al la popola krea arto. Diapozitivoj helpis pli bone ekkoni la trezorojn de la pola kulturo.

Poste la partoprenantaro ĝuis la verve prezentitan duaktan komedion de la pola verkisto A. Cwojdzinski „La hipnoto“. La speciale por IFER el Varsovio venigitaj geaktoroj Kalina Pieńkiewicz kaj „Zbyszek“ Dobrzyński ne nur ravis la spektantaron, sed ankaŭ raportiston de Radio GDR, kiu petis (kaj ricevis) intervjuon. Ne mirige, ke la postprezenta „aŭtogramhoreto“ renkontis viglan eĥon.

La vespero finiĝis kun dancado laŭ diskaj kaj sonbendaj ritmoj, kelkfoje interrompita por loti memordonacojn.

La sekvan matenon, somere varma sunbrilo en Leipzig ŝanceligis ĉe kelkaj personoj eĉ la dimanĉan vizitoplanon, kiu alternative ofertis: viziton de la Georgi-Dimitrov-Muzeo, de la 100-jara Zoologia Ĝardeno aŭ de la Monumento de la Interpopola Batalego. Per ĉi lastaj programeroj finiĝis IFER '78. Multaj partoprenantoj sincere bedaŭris, ke IFER ne pli longe kunigis ilin en vere internacia rondo kun harmonia atmosfero. Aliaj tuj petis aliĝilon por IFER '79.

Konkludo: IFER bone sukcesis en la granda aro de internaciaj aranĝoj kaj konkeris la korojn de siaj partoprenantoj. Kaŭzo do por prepari IFER '79! Pli atrakcie, pli amplekse, pli sperte.

H. A. Mann

IFER 1979

En sia unua kunsido la nova Organiza Komitato de IFER decidis okazigi la Internacian Foiran Esperantistan Renkontiĝon 1979 de la 9a — 11a de marto en 1979. La temo „Jen — kiel ni kreskis“ aludas la 30an datrevenon de la fondiĝo de GDR, okazonta en oktobro.

El letero:

Jen kiel jam planas sian partoprenon al IFER 79 ĉeĥaj esperantistoj. Ili skribis: „Do karaj geamikoj esperantistoj: post la kongreso en Varna ni ŝparos por IFER 79 en Leipzigo kaj lasos al ni tiun ĉi ĝuon forigi nek de la malsano, nek de la morto! Ĝis revido!

Jelínková, Janda kaj pluaj.

★

„Kvar ĉapitroj GDR“

Jen la titolo de nova kolora filmo pri GDR en Esperanto. Ĝi estas komentaria superrigarda filmo, 30-minuta, lumsona. La filmo estas pruntepreneblа ĉe CLE.

INTERNACIA RENKONTIĜO DE KURSGVIDANTOJ
- IKURE BERLIN 1978 -

La Distrikta Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR Berlin kore invitas vin partopreni

La renkontiĝo okazos de la 4a ĝis la 9a de decembro 1978

en bone ekipita feria domo, situanta en Wesendahl proksime de Berlin. La celo de la renkontiĝo estas kontribui per teoriaj prelegoj pri pedagogiaj, metodikaj kaj didaktikaj problemoj same kiel per praktikaj ekzemploj kaj ekzercoj al la pliperfektiĝo de la kursgvidanta laboro de tiuj, kiuj jam instruas Esperanton aŭ intencas instrui en estonteco. Lingvoscio kaj parolkapableco nepre estas kondiĉo por la partopreno. La programo enhavos antaŭtagmeze la praktikan laboron, posttagmeze teorion prezentotajn de fakuloj kaj scienculoj. La vesperoj estos liberaj. Krome urbvizitado, filmprezentado kaj distra vespero. La partoprenkotizo kostos M 120,—, pagenda ĝis la 15a de oktobro 1978 al la poŝtĉekkonto Berlin 487 40 de Bezirksarbeitskreis Esperanto 102 Berlin, trans Deutsche Außenhandelsbank AG Berlin. Gi altiĝas al M 140,—, se vi pagos pli poste aŭ ĉe alveno. La kotizo inkluzivas la loĝejon, manĝaĵojn kvinfoje po tago kaj la komunan alveturon ekde Berlin kaj la reveturon al Berlin. Partoprenontoj, kiuj intencas kontribui ion al la faka aŭ distra programo estas petataj rimarkigi tion sur la aliĝilo.

Venu por travivi kelkajn tagojn en Esperanto-medio kaj konatiĝu kun Berlin, ĉefurbo de GDR.

Bonvolu anonci vin baldaŭ kaj postulu ceterajn informojn kaj aliĝilon. La partoprennombro estas limigata.

Distrikta Laborrondo Esperanto
en Kulturligo de GDR Berlin
110 Berlin, Postfach 67

*

Jugendseminar im November

Ein Seminar für junge Esperantisten findet vom 20. — 24. November 1978 in Wehsendahl bei Strausberg statt. Das Seminar behandelt Probleme der internationalen und nationalen Arbeit junger Esperantisten sowie aktuelle außenpolitische Probleme und bietet breiten Raum den vielfältigen Fragen der internationalen Sprache Esperanto in Theorie und Praxis. Es wird weiterhin Möglichkeit für sprachliche Übungen geboten. Die Teilnahme ist kostenlos. Junge Esperantisten, auch Teilnehmer ähnlicher zurückliegender Seminare, melden sich bei ihrem Bezirksarbeitskreis Esperanto **und** beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto an und erhalten dann weitere Informationen.

Das 12. Kaderseminar

Seit 1966 führt der Zentrale Arbeitskreis, zum größten Teil in Bad Saarow, regelmäßig Seminare zur Weiterbildung ehrenamtlicher Leitungskader der Esperanto-Gruppen durch. Sie dienen der politisch-ideologischen und fachlichen Qualifizierung.
Das 12. Seminar findet vom 27. November bis 3. Dezember 1978 in Wehsendahl bei Strausberg statt. Das Programm sieht wieder interessante Vorträge zu außen- und innenpolitischen Fragen, zu Problemen der internationalen Esperanto-Bewegung sowie zu fachlichen Fragen des Esperanto vor.
Die Teilnahme am Seminar ist kostenlos. Interessenten melden sich bei ihrem zuständigen Bezirksarbeitskreis Esperanto **und** beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto an.

Jugendseminar in Wehsendahl

Die Durchführung von Jugendseminaren hat sich in den letzten Jahren zu einer guten Tradition entwickelt. Diese Seminare dienen nicht nur zur Vermittlung von politischen, fachlichen und sprachlichen Kenntnissen, sondern geben der Jugendkommission immer wieder Anstöße zur Verbesserung der Jugendarbeit. Das trifft auch voll und ganz auf das letzte Jugendseminar zu, das vom 22. bis 26. Mai in Wehsendahl bei Berlin stattfand. Hier wurden u. a. Kenntnisse über den internationalen Stand der E-Bewegung und über Esperanto in Theorie und Praxis vermittelt. Eine Vorlesung von Gen. Fleischer vom Zentralrat der FDJ dokumentierte die gute Zusammenarbeit der jungen Esperantisten mit dem sozialistischen Jugendverband. Daneben nutzte man selbstverständlich auch die Möglichkeiten zur zwanglosen Unterhaltung. Einen besonderen Akzent erhielt das Seminar durch die Anwesenheit von Jerzy Grum, der in gemütlicher Runde über die Arbeit bei Polskie Radio und seine eben beendete Reise durch vier asiatische Länder berichtete. *Michael Lennartz*

Fruktodona interparolo kun LGJ

Okazis la 12. 5. 1978 fruktodona interparolo inter reprezentantoj de CLE kaj ties Junulara Komisiono kun funkciuloj de la Centra Konsilantaro de Libera Germana Junularo en Berlin. La interparolo montris multajn eblecojn de estonta kunlaboro.

Intervjuo en Radio

La junulara programo „Hallo“ de la stacio „Voĉo de GDR“ dissendis dimanĉe, la 28an de majo, kaj vendrede, la 2-an de junio, ampleksan intervjuon pri Esperanto, faritan kun d-ro Detlev Blanke, sekretario de Centra Laborrondo.

Tonbanddienst

Welcher technisch und sprachlich versierte Esperantist wäre bereit, den umfangreichen Tonbanddienst des Zentralen Arbeitskreises zu betreuen? Er muß über Kassetten- und Rundbandgeräte verfügen und in der Lage sein, Tonbandkopien anzufertigen.
Meldungen zwecks genauerer Absprachen erbittet der Zentrale Arbeitskreis Esperanto, 108 Berlin, Charlottenstraße 60.

Nova libro ĉe CLE

„Esperanto: Lingvo, movado, instruado“, red. Detlev Blanke. Kulturbund der DDR, Zentraler Arbeitskreis Esperanto, Berlin 1977, 187 pĝ. Prezo *por GDR* 6 markoj, recivebla nur ĉe Centra Laborrondo. La libro prezentas en formo de antologio diversajn fakajn artikolojn, kiuj aperis en „der esperantist“, „Paco“ aŭ kiel ĉapitroj en ne plu aŭ malfacile alireblaj verkoj. La enhavo de la libro estas jena: Antaŭparolo, I. Planlingvaj projektoj kaj planlingvo, II. La lingvo Esperanto, III. Movado, IV. Instruado, V. Aldonaĵo.

La verko servas kiel studotekstoj por ekzamenoj en GDR (niveloj B, C, D) kaj prezentas entute valoran enkondukan materialon por teorie interesita esperantisto.

La enhavo:

M. I. Isajev: Pri la lingvo de l'estonto / D. Blanke: Planlingvaj projektoj kaj la planlingvo Esperanto / D. Blanke: La antikvaj lingvoj kaj la problemo de internacia lingvo / E. A. Bokarjev: La internacia lingvo-situacio kaj eblecoj de raciigo / L. Zamenhof: Plena Gramatiko de Esperanto / K. Kalocsay: Esperanta vortfarado / Rekomendoj de la Akademio pri Vortfarado / E. A. Bokarjev: Fonemo kaj sono en Esperanto / K. Kalocsay: Esperanta elparolo / L. Zamenhof: Eltiro el privata letero al s-ro Borovko / D. Blanke: Pri la stato de la internacia aplikado de Esperanto / D. Blanke: Jubilea Kongreso en Kopenhago / Nguyen Van Kinh: Esperanto serve al internacia amikeco kaj mondpaco / W. Gilbert: Esperanto servu al paco! / A. Balague: Estiĝo de MEM, ĝiaj misio kaj celoj / El la statuto de MEM / G. Holmkvist: La statuto de MEM, fonto de inspiro kaj gvidilo / Gemeinsame Erklärung – Komuna Deklaro / Rezolucio de UNESKO pri Esperanto / Wichtiger Beschluß der Akademie der Wissenschaften der USSR / Grava decido de la Akademio de Sciencoj de USSR / A. Pettyn: Antaŭ ol komenci kurson / V. Oljanov: Metodikaj demandoj de la instruado de Esperanto / A. Pettyn: Novaj tendencoj en la instruado de Esperanto / D. B. Gregor: La fontoj de Esperanto / Sciencaj publicaĵoj en GDR pri la planlingva problemo kaj pri Esperanto.

(*„Esperanto: Sprache, Bewegung, Unterricht“ ist der Titel einer vom Zentralen Arbeitskreis Esperanto 1977 herausgegebenen Anthologie. Das 187 Seiten umfassende Werk macht den Leser mit grundlegenden theoretischen Materialien über Esperanto in Theorie und Praxis bekannt. Es ist Pflichtlektüre für Kandidaten der Sprachkundigen-Prüfungen und ist für M 6,– beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto erhältlich.*)

Bibliothekare!

Wer hätte Interesse, an der Fertigstellung eines Zentralen Katalogs der Esperanto-Literatur der DDR (ca. 6000 Titel) mitzuarbeiten? Informationen beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto.

Eĉ tio okazis

Ruzajo

Per truko ŝtelisto sukcesis fuĝi el malliberejo en Birmingham. Li ŝajnigis apendiciton kaj fuĝis dum transporto al hospitalo. Nun li estas denove malantaŭ kradoj. Post sia fuĝo li kolapsis sur la strato. La kuracistoj konstatis: apendicito.

Mirakla telefono

Kiam la telefono de la brito Ron Thompson en Tanfield malfunkcias li ne bezonas molesti la poŝton. Anstataŭ tio li prenas verŝilon kaj akvumas sian ĝardenon. Tuj aŭdeblas la fama telefona signalo. La poŝto klarigis la „miraklon". La terkablo verŝajne ie disrompis, kaj per akvo la interligo refunkcias.

Ĉu urĝa telefonado?

Por redukti la nombron de privataj paroladoj de siaj oficistoj posedanto de teksaĵ-firmao en Oslo gluigis admonon sur la telefonaparaton: „Ĉu la parolado vere estas urĝe necesa?" Jam la sekvintan tagon legeblis: „Kiel maniere oni antaŭe sciu tion?"

Danĝera arbo

Kiam James Stowe el Jacksonville, Usono, rimarkis fagon inklini flanken kaj minaci la tegmenton de lia domo, li venigis arganon. La argano elterigis la arbon, transportis ĝin tra la aero kaj faligis ĝin tra la tegmento precize en la dormoĉambron de Stowe.

Sana naĝado

La turisma administrejo de la svisa urbeto Yverdon eldonis prospekton laŭdantan la belecon de la lago de Neuchâtel. Legeblas la profundsenca konstato: „Naĝado estas plej sana por maljunaj kaj junaj; eĉ se vi ne kapablas trapasi la malmultajn kilometrojn ĝis la alia lagobordo."

Solvo de la enigmo el „de" 2/78 p. 17

1. libera
2. ebenaĵo
3. truo
4. etudo
5. referaĵo
6. orgeno
7. plasto
8. remparo
9. interesi
10. libro
11. arbaro
12. dianto
13. ekstra
14. vino

La nomo de la mallonga skribaĵo de Zamenhof estas: „Letero pri la deveno de Esperanto"

k h s

Solvo de la krucvortenigmo el „de" 3/78

A. Arta, ankre, team(o). — **B.** At, **Ĉiu esperantisto,** KI. — **C.** Mod(o), okr(o), aerobia, mev(o), vid(i). — **Ĉ.** Akra, Ou, klopodo, OO, ŝimo. — **D.** Tiama, mas(o), tre, ĝen(i), varoj. — **E.** Opero, ro, riz(o), ir(i), rikan(i). — **F. Laboru por paco.** — **G.** Mimik(o), piano.

Pola esperantisto skribis al ni:

Impresoj pri Potsdama Rekontiĝo

Komence de la kunveno parolis la Unua Sekretario de Distrikta Estraro de Kulturligo en Potsdam, kamarado Heinz Rupp. Tiu-ĉi homo ĉiutage sin tre engaĝas por la laboro de Kulturligo, kaj kun lia gvidado tiu-ĉi por mi interesa organizo, certe bone funkcias. Sinjoro Rupp parolis pri la kunligoj de la laboro de la esperantistoj en Kulturligo kun ĉiuj aliaj rondoj en tiu-ĉi organizo, por la bona plenumo de la decidoj de la lasta Kongreso de SUPG (SED) en la kultura sfero de la socia vivo. La tre klaraj esprimoj de k-do Rupp certe bone eksonis en la animoj de ĉiuj partoprenintoj . . .

Pri la lastatempaj laboroj de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, kaj pri la eventoj en la monda Esperanto-movado parolis d-ro Detlev Blanke. Li akcentis i. a. gravajn eventojn en la vivo de sovetaj verdstelanoj kaj de esperantistoj el aliaj landoj. Li raportis ankaŭ pri la Universala Kongreso en Reykjavik kaj ĝia historia signifo kunligita kun partopreno en ĝi de la ĝenerala sekretario de UNESKO . . .

Alia amikino, kiun mi renkontis sur potsdama gastama tero, estas la prezidantino de Distrikta Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, sinjorino Hanna Scheffs. Tiu-ĉi tre laborema, plenplena de bonkora ĝentileco, virino en engaĝiga gvidado de Laborrondo, dediĉas multegajn fortojn por nia celo, por amikeco pere de E—o, por plialtigo de nivelo de laboro por kaj per Esperanto, por mondpaco. Ŝia sindediĉo estis atestebla dum ĉiuj preparlaboroj kaj dum la kunveno. Miaopinie havi tian prezidanton de esperantista organizo estas feliĉo por ĉiuj membroj. Ŝiaj eldiroj dum la potsdama festo certe entuziasmigis ankaŭ ĉiujn partoprenintojn, kiel ankaŭ min. Sinjoro Ludwig Schödl, ĉiam bonhumora, tradukis interesajn priskribojn de ĉiĉerono pri urbo Potsdam, kaj ankaŭ parolis pri la laboro de Centra Laborrondo E—o en Kulturligo de GDR. Dum la kunveno mi kun intereso ekvidis koloran filmon en Esperanto pri GDR, bonege montranta la vivon de GDR-socio sub gvidado de SUPG. Mi pensas, ke tiun-ĉi filmon devus ekvidi multaj homoj el diversaj landoj, por povi pli bone kompreni la vivon de la germanoj en la socialisma patrujo.

Interesaj estis ĉiuj kontaktoj kun la samideanoj el Potsdam . . . Estis feliĉe travivi en Potsdam, en vere amika medio, tiun-ĉi sunan festotagon. Grandajn sukcesojn, karaj potsdamaj samideanoj en laboro por amikeco kaj mondpaco pere de Esperanto-movado!

Stanislaw Smigielski
el Pollando

10-a distrikta renkontiĝo en Berlin

Pli ol 50 esperantistoj kunvenis la 18-an de junio 1978 en Berlin por partopreni la 10-an distriktan renkontiĝon. Ĝi okazis en la Klubdomo de fervojistoj, nomita iaŭ Erich Steinfurth, iama membro de Germana Laborista Esperanto-Asocio.

Post malfermo fare de Ernst Schonert, estro de la DLE Berlin; sekvis interesa kaj viglega diskuto pri la aktuala agado de la esperantistoj.

Siajn tre pozitivajn impresojn pri la internacia scienca seminario „Sciencaj aspektoj de Esperanto", kiu okazis dum aprilo 1978 en Ahrenshoop, prezentis prof. Falkenhahn. D-ro D. Blanke kompletigis kaj aŭskultigis sonbende partojn el la prelegaro. Sed kulmino de la renkontiĝo estis la prezento de la duparta monodramo de André Guelmo „Jean kaj mi", ludita de la profesia aktorino Eva Seemannova el Prago. Se ankaŭ eble povas regi diversopinieco pri la enhavo de la pli ol duhorojn daŭra spektaklo, absolute sendube estas la profunde impresa ludo de la aktorino. Ŝi sukcesis per sia senriproĉa lingvaĵo kaj profunda esprimarto kapti ĉies atenton montrante tiel tre bele Esperanton kiel scenejan lingvon.

Sekvis la esperante sinkronizita kolora filmo „Kvar ĉapitroj GDR", kiu rikoltis spontanan aplaŭdon. Entute utila renkontiĝo de Berlinanoj kun siaj gastoj el apudaj distriktoj. —e

★

II-a Esperantista renkontiĝo de la tri nordaj distriktoj en Neubrandenburg

Pli ol 40 gesamideanoj sekvis la inviton de la DLE Neubrandenburg partopreni la II-an Konferencon de la tri nordaj distriktoj la 6-an de majo 1978. Kiel gastoj el la distriktoj Rostock kaj Ŝverin bonvenigis la prezidanto de DLE Nbg., ligoamiko W. Pfennig, la estrojn de la nomitaj DLE kaj kelkajn pluajn aktivulojn. La tagordo enhavis lumbildprelegojn, diskutadon pri la sekvonta kunlaborado inter la tri distriktoj, vizitadon de ekspozicio k. t. p. Unuafoje ankaŭ okazis prelego pri tute neesperantista temo. Sinjoro prof. Rzymkowski el Koszalin/Pollando — jam bone konata al la geamikoj de la gastiganta distrikto — prelegis pri lignokonstruado de la slavaj prahomoj. Ege interesa prelego!

Gravajn informojn pri la Internacia Scienca Seminario pri interlingvistiko kaj esperantologio en Ahrenshoop kaj pri la UK en Varna 1978 ricevis la partoprenantoj de la renkontiĝo de ligoamiko d-ro Blanke.

Carola Lehr

★

Germana-pola renkontiĝo en Rostock

La 10./11. de junio 1978 10 esperantistoj de Pola Esperanto-Asocio, Filio el Szczecin restadis en Rostock surbaze de la funkcianta amikeckontrakto. Ili partoprenis urbovizitadon, priparolis komunan agadon kaj subskribis komunan proteston kontraŭ la neŭtrona bombo.

Ni kore gratulas

- al la veterano de la laborista Esperanto-movado kaj iama membro de CLE, k-do Willi Zimmermann, kiu festis la 12an de majo 1978 sian 75an naskiĝtagon.
- al la konata aktivulo ĉebaltmara kaj veterano de la laborista Esperanto-movado, k-do Werner Plate, estro de DLE Rostock, kiu festas la 18an de septembro 1978 sian 65an naskiĝtagon.
- al Alfred Kraushaar el Berlin, veterano de la laborista Esperanto-movado, kiu fariĝis 75jara la 3an de marto 1978.
- al prof. d-ro Stojan Ĝuĝev el Bulgario, membro de la Akademio de Esperanto, prezidanto de Muzika Esperanto-Ligo kaj konata esperantologo, kiu fariĝis laŭreato de la aŭstra ŝtata Premio Herder por la jaro 1978 por „atingoj en la scienco kaj arto, speciale en la muzika etnografio".
- al k-do T. Kulagin el Moskvo, postdate okaze de lia 80-a naskiĝtago (12. 2. 1978) kiu ofte provizis nian revueton per materialoj.
- al Rudolf Eichler el Schwarzenberg, kiu ricevis la „Meritmedalon de GDR".
- al la iama laborista esperantisto Erich Ehmig okaze de lia 70a naskiĝtago, la 13an de aŭgusto 1978.
- al Erich Würker, kiu distingiĝis per la Johannes R. Becher-medalo en oro, la plej alta distingo de Kulturligo de GDR.

Ni kondolencas

- Forpasis la 4an de marto 1978, 67-jara. la konata ĉeĥa esperantisto František Sviták.
- Forpasis la 24-an de marto 1978 d-ro Lajos Marton el Budapest, aktivulo de Mondpaca Esperantista Movado kaj de Hungara Esperanto-Asocio.

Heinrich Böll en Esperanto

Fine de la jaro aperos en Esperanto la konata novelo de la nobelpremiito Heinrich Böll „La perdita honoro de Katarina Blum". La novelon, kiu ankaŭ estas filmigita, tradukis la okcidentgermana esperantisto Richard Schulz (ne miksenda kun d-ro Karl Schulze). La novelo aperos ĉe Edition Leipzig.

Artikolo en influhava revuo

La organo de la centra estraro de la Ligo de Ĵurnalistoj de GDR „Neue Deutsche Presse" (Nova Germana Gazetaro) en numero 4/1978 (aprilo) publikigis artikolon de Wilfried Dorow (p. 29) „La plej juna lingvo de la mondo — iom pri Esperanto". La tute objektiva artikolo, eĉ sufiĉe amplekseta, certe havos siajn sekvojn helpante forigi kelkfoje ankoraŭ rimarkeblajn antaŭjuĝojn en la rondo de ĵurnalistoj.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Brazilio

Studento/bankoficisto, 22j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Francisco Eduardo Lupión, Caixa Postal 5746, **CEP-01000, Sao Paulo**

Bulgario

Studentino dez. kor. k. samaĝuloj: Maja Masljankova, **5040 Samorodeni,** Okrâg Veliko Târnovski

ČSSR

Se vi volas korespondi kun esperantistoj el Slovakio vi povas aperigi vian korespondanonceton en ESPERANTISTO SLOVAKA, sendinte ĝin al ties red. E. V. Tvarožek, Hodžova 1939/6, **91101 Trenĉin**

Studentino, 20j., dez. kor. k. esp. el GDR: Irena Kočibová, Malá Bystřice 140, **75627 Val. Bystřice** okr. Vsetin

Fervojisto, 24j., dez. kor. k. geesp. el soc. landoj: Zdeněk Polàk. Družstevni 690, **69123 Pohořelice**

Josef Zákoutský, ul. Havliĉkova 430, **50901 Nová Paka,** 20j., dez. kor. tutmonde pri sporto, naturo, muziko

Marianna Kuchárová, **97643 Strojáreň Piesok,** dez. kor.

Adolf Staňura, **70800 Ostrava Poruba,** Čkalov-str. 863, dez. kor.

Vladimir Němec, **01001 Žilina 1,** Hliny 722 A, dez. kor. k. gepatroj (36—32j.) de denaskaj infanoj-esperantistoj (6—3j.)

Jaroslav Šajtar, **70800 Ostrava 8,** Rabasova 1156, dez. kor., kol. bk.

Frybert František, **Brno 16,** Poznaňská 6, dez. kor. k. radioamatoraj-esp.

Gambio

Dez. kor. s-ro Samba Faal, PO Box 772, **Bangul,** The Gambia

GDR

Komencanto/lernanto, 15j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Dirk Eßling, **209 Templin,** Am Birkenhain 7, Fach-Nr. 1007

Instruistino, 23j., dez. kor. tutmonde: Bärbel Judersleben, **7251 Burkartshain,** Diesterwegstr. 16

Fotoamatoro, 45j., komencanto, dez. kor. p. ĉ. t.: Helmut Krone, **1502 Potsdam-Babelsberg,** Gluckstr. 58

Hungario

Narkota asistantino, 27j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Gitta Szilágyi, **6000 Kecskemét,** Izsáki u. 5

Dez. kor. tutmonde: Moczár Sándor, 6100 **Kiskunfélegyháza,** pf. 31, 40j. — Tresz Csaba, **6100 Kiskunfélegyháza,** Repülötér, 14j. — Herédi Mária, **6100 Kiskunfélegyháza,** Szeder Str. 21, 14j. — Tanyai Kollégium (gajaj ursidoj), **6100 Kiskunfélegyháza,** Bajcsi-Zsilinski ut. (12j. gelernantoj)

Instruistino, 46j., dez. kor.: Erzsébet Alot, **6800 Hódmezövásárhely,** Tanácsköztárs, p. k. 54

Pensiulino, 59j., dez. kor. k. similaĝaj geesp. el GDR p. ĉ. t.: Gizela Tasnádyi, **1222 Budapest XXII,** Jozsefá u. 26 C. fszt. 3

János Balczer, **1042 Budapest,** Geduly u. 1/a, dez. kor. k. esp. el GDR, kol. pm

Maŝinmuntisto, 25j., dez. kor. k. samaĝa junulino el GDR p. ĉ. t.: Iván Varga, **9134 Bodonhely,** Dózsa Gy. u. 72

Instituta profesoro, 33j., dez. kor. k. esperantistino el Berlin pri div. temoj: D-ro Attila Salga, **3301 Eger,** pf. 43

Italio

Fabio Vivoda, via XXV aprile, 4, **34074 Monfalcone-GO,** dez. kor. tutmonde pri lingvoj, muziko, sporto

Sekretariino, 29j., dez. kor., kol. bk. pm: Ivana Mora, **20129 Milano,** Via Amadeo d'Aosta 3

Junulino, 16j., dez kor.: Annalisa Mancini, **55045 Ponterosso,** Lucca, Via Vaiana 2

Cristina Zambotti, **20128 Milano,** Via del Ricordo 2, dez. kor.

Leopoldo Teormino, **20134 Milano,** Via Crescenzago 3, dez. kor.

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 639